# 107-a Universala Kongreso de Esperanto

## Montrealo, 6 – 13 aŭgusto 2022



# Unua Bulteno

107-a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO
MONTREALO 2022


Post la deviga du-jara interrompo pro la pandemio, Montrealo, ree, pretas gastigi la Universalan Kongreson! Se vi jam planis partopreni la Montrealan UK-on, ni esperas ke Montrealo estas denove en viaj planoj! Kaj se vi ne pensis veni en 2020, jen bela okazo viziti nin en 2022!

Nia urbo jam gastigis multajn gravajn eventojn: la Tutmondan Ekspozicion en 1967 ("Expo 67"), la somerajn Olimpikojn en 1976 kaj jen, pli ol 110 jarojn post la vizito de Zamenhof en 1910 al Nord-Ameriko — kaj Montrealo! — nia urbo iĝos nia monda ĉefurbo per gastigo de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto!

## Multkultura kaj bonveniga

Kio apartas pri Montrealo? Nu, ĉio! Oni ofte nomas Montrealon la plej eŭropeca urbo en Nordameriko, pro ĝiaj kulturo, arĥitekturo, kutimoj kaj lingvoj. Ĉu vi sciis, ke, post Parizo, Montrealo estas la plej granda urbo en la mondo rilate la nombron da denaskaj parolantoj de la franca? La franca estas la ĉefa lingvo de la urbo kaj de la provinco Kebekio – unika fakto en Nord-Ameriko! La angla estas la dua







plej parolata lingvo en Montrealo, sed oni ne povos paŝi eĉ kelkajn metrojn urbocentre sen aŭdi almenaŭ dekon da aliaj lingvoj. Montrealo ja bonvenigis homojn de diversaj etnoj, lingvoj kaj religioj, el ĉiuj anguloj de la mondo, kaj riĉiĝis kulture kaj gastronomie dank' al siaj novaj loĝantoj. Ankaŭ vi povos konatiĝi kun tiu diverseco promenante tra pluraj etnaj kvartaloj de Montrealo kun famaj, tipe montrealaj, eksteraj kurbŝtuparoj kaj ĝardenetoj.

Dumkongrese vi lernos ankaŭ pri diversaj indiĝenaj kulturoj de nia regiono – ege grava parto de nia kanada heredaĵo, kaj, efektive, la temo de la Montreala UK en 2022: "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj", por speguli la Jardekon de Indiĝenaj Lingvoj de UN (2022-2032).

La vorto "Montrealo" devenas de la nomo "Mont Réal" – la "Reĝa Monto", kiu situas meze de la urbo kaj videblas de pluraj partoj de ĝi. La Reĝa Monto estas la plej granda inter multegaj montrealaj parkoj kaj estas elstara loko por ripozi, sportumi, pikniki kaj fari belegajn fotojn kun vido al la urbo kaj la majesta riverego Sankta-Laŭrenco.



## Ni kongresos urbocentre!

Nia kongresejo situos urbocentre, de kie vi povos piediri ĝis la riverego kaj atingi ĉiujn vidindaĵojn en la proksimo piede, metroe, bicikle aŭ buse. Montrealo havas ĉirkaŭ du milionojn da loĝantoj; ĝi estas la dua plej granda urbo en Kanado (post Toronto) kaj proponas al la vizitantoj senlimajn vidindaĵojn, artajn kaj kulturajn programojn, mondfamajn festivalojn kaj manĝeblojn. Nia urbo estas hejmo de cento da muzeoj, historiaj domoj, artgalerioj, preĝejoj kaj katedraloj. Pli ol dek milionoj da turistoj venas viziti la urbon ĉiujare! Montrealo estas sekura loko, aparte agrabla aŭguste (15-25°C). Ĝi situas proksime al Otavo kaj Kebeko (2-3 horojn for), kaj nemalproksime de Toronto kaj Niagaraj Akvofaloj, Novjorko kaj Bostono. Notu ke Kanado jam malfermis la pordojn al plene vakcinitaj vizitantoj! Bonvenon al Montrealo-2022!

## Pli da informoj

uea.org/kongresoj (aliĝilo)

esperanto2022.ca

facebook.com/Montrealo.kongreso



# Kongresaj Perantoj

**Belgio** Claude Glady, 1 rue du Culot, 5630 Cerfontaine *aŭ* Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstr. 169, 2060 Antwerpen

**Britio** Esperanto-Asocio de Britio, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

**Ĉeĥio** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p/a Petro Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice

**Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, 100037 Beijing *aŭ* Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro Ora Ponto, Shijieyu Zhongxin, Jingchuan-Xian, 744300 Pingliang

**Danio** Ileana Schrøder, Vestavej 4, 2770 Kastrup

**Estonio** Ahto Siimson, Rüssa tee 2, Liu, 88313 Pärnu, Pärnumaa

**Finnlando** Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

**Francio** Espéranto-France, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris

**Germanio** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger Str. 9, 55129 Mainz

**Hispanio** Pedro A. Garrote Escribano, c/ Las Mercedes 5-5º-C, 47006 Valladolid *aŭ* Kataluna Esperanto-Asocio, Hotel d'Entitats Can Guardiola, carrer Cuba 2, 08030 Barcelona

**Hungario** Hungaria Esperanto-Asocio, Pf. 193, 1368 Budapest

**Israelo** Jehoŝua Tilleman, 97-a Dereĥ-Akko, 2637324 Kirjat-Mockin

**Italio** Itala Esperanto-Federacio, via Villoresi 38, 20143 Milano

**Japanio** Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, 162-0042 Tôkyô-to

**Kanado** Kanada Esperanto-Asocio, 414-110 Grand Avenue, London ON, N6C 1L8

**Korea Resp.** Korea Esperanto-Asocio, 464 Ho, 217, Toegye, Jung-gu, 04558 Seoul

**Latvio** Margarita Želve, Rūpniecības iela 35-13, Rīga 1045

**Litovio** Litova Esperanto-Asocio, ab.k. 167, 44002 Kaunas

**Meksiko** Meksika Esperanto-Federacio, c/o M. Martínez, Av.523, No. 187, 1ª sección de San Juan de Aragón, Del. G.A. Madero, 07969, México DF




**Nederlando** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam

**Norvegio** Agnar Fitjar, Wiers Jenssens vei 33A, 5089 Bergen

**Pollando** Jan Skonieczka, ul. Chłodna 23ª, 85 -345 Bydgoszcz

**Portugalio** Portugala Esperanto-Asocio, Praceta Humberto Delgado, 1 - B, Monte Abraão, 2745-318 Queluz SNT

**Rusio** Halina Gorecka, ab.ja. 1205, 236039 Kaliningrad

**Slovakio** Ľubomír Fajth, Prosné 161, 01 801 Udiča

**Svedio** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, LGH 1303, 931 38 Skellefteå


**Svislando** Konto CH86 0900 0000 1200 2310 0 je la nomo "Universala Esperanto-Asocio"

**Usono** Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland, ME 04103

**Sendu viajn aliĝilon kaj pagon al la sama adreso. Aliĝojn oni traktos nur post pago de la kotizo.**








Venu sciuri en Montrealo!
fotoj: Tourisme Montréal kaj Pixabay

